

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 19. Aprilo 28, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Plurlingvismo sub lupeo en Barcelono

La 2-an de marto disvolviĝis [konferenco pri Esperanto, plurlingvismo kaj sociaj movadoj](#) en Barcelono, organizita de la Departamento pri Angla Filologio kaj Ĝermaniko de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kaj la Filologia Sekcio de la Instituto pri Katalunaj Studoj,

Prelegis profesoroj Roberto Garvía, de la Universitato Karolo la 3-a, kaj Guilherme Fians, de la Universitato Saint Andrews, kaj sekve disvolviĝis ronda tablo, kun partopreno de la antaŭaj kaj de profesoroj Monica Heller, Maria Rosa Garrido, Nicolau Dols kaj Xavier Alcalde.

Vespere estis organizita [gvidata promeno](#) tra la stratoj de la kvartalo Gràcia, sekvanta la historion de Esperanto kaj aliaj sociaj movadoj en tiu historia kvartalo. La prezentojn kaj la debaton eblas spekti en tiu ĉi ligilo: <https://www.youtube.com/live/WGY02mHyF5k>.

Kelkajn tagojn antaŭe Xavier Alcalde estis publikiginta artikolon en la blogo de la Revuo pri Lingvo kaj Juro de la kataluna registaro, pri Esperanto kaj ĝia nuna stato, kiun eblas legi (katalunlingve) en jena ligilo: <https://gen.cat/3YQYIcN>.

Ĉina kongreso kun elekto de nova estraro

En la 25-a de marto en Pekino okazos la 14-a Ĉina Kongreso de Esperanto. Ĉi-jare la kongreso elektos la novan estraron de Ĉina Esperanto-Ligo kaj novan komitaton; la ĉeftemo estas Nova Epoko, Novaj Taskoj kaj Nova Progreso, ĝis hodiaŭ pli ol 140 homoj sin anoncis en la kongreso, laŭkalkule pli ol 200 esperantistoj partoprenos la kongreson. Estas bonvene, se vi nome de via landa asocio sendos salutmesaĝon

Chen Ji, Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo



Ĉi-semajne aperis en **Brazila Kolekto** pluraj kantoj famigitaj de inaj voĉoj: *Troltreno*, verkita de **Edu Lobo** k **Vinicius de Moraes**, impulsis la sukcesan karieron de la kantistino **Elis Regina**.

Kiam oni pensas pri la kanto *Argenta pluv'*, de **Ed Wilson** k **Ronaldo Bastos**, tuj sonas en nia kapo la voĉo de **Gal Costa**.

Kaj la belan kanton *Animo* famigis **Simone**, kaj memorigas nin pri ĝia ĵus forpasinta aŭtorino, **Sueli Costa**. Krome, spektu la videon de **bando Merlin**:

La muzea urbo en Ĉinio proponas kurson

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Zaozhuang-a Universitato

Gvidantonomo: Alessandra Madella

Tipo: Nova universitata kurso

Loko: Zaozhuang, Ĉinio.

Aldoninto: Luigia

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27523>

Danuba Zom-kunsido pri edukado

20 partoprenantoj en la 18-a de marto eniris la vokon el Danubaj landoj: Bosnio-Hercegovino, Bulgario, Grekio, Hungario, Kroatio, Serbio kaj eble pliaj, kiuj ne vidigis sian landon. La tuto okazis sub gvido de Renato Corsetti, Britio. La ĉefa temo estis la starigo de kursoj tra la regiono, surlokaj, universitatoj kaj retaj kune kun planoj kaj intencoj por plua agado.

Italaj kursoj abunde kj multloke

Esperanto ĉiam estis avangarda en la eduka kampo. Tial certe ne povis manki evento kiel Didacta, okazinta en Florenco, ĉe la Fortezza da Basso, de la 8-a ĝis la 10-a de marto 2023, dediĉita ĝuste al novigo kaj esplorado de la instruado.

Ni esperantistoj jam partoprenis en la pasintjara kvina eldono, prezentante paroladon. Ni ĉeestis en ĉi tiu sesa eldono kun rimarkinda flugfolio-operacio: Dum tiuj tri tagoj estis donitaj ĉirkaŭ 10.000 flugfolioj en la foiro kaj ankaŭ en kelkaj florencaj lernejoj. Lakonferenco de Laura Brazzabeni temis pri la projekto "30 oraj horoj". Pluraj instruistoj kaj lernejestroj de Torino, Bergamo, Milano, Trento, Venecio, Ferrara, Bologna, Ĝenovo, Massa, Prato, Florenco, Peskaro, Bari, Foggia, Napolo, Rieti, Romo, Peruĝo, Katanio, Sirakuzo, Palermo, Lamezia Terme, Napolo kaj aliaj

urboj haltis kaj petis informojn. Dankon ni ŝuldas al la toskanaj samideanoj Brunetto Casini, Nicola Morandi, Enrico Borrello, Marco Cecchi, Antonio Ghu kaj Raffaello Dazzini, kiuj disdonis la flugfoliojn kaj al la membroj de la florenca esperantista asocio Carla Cenni, Brunella Moracci, Enrico Brustolin kaj Lucia Sanna, kiuj promociis la iniciaton. Same ni deziras danki ankaŭ al Riccardo Pinori kaj al la prezidanto de IEF (Itala Esperanto-Federacio) Luigi Fraccaroli, kiuj konstante subtenis la eventon ĉe la administraj aŭtoritatoj de urbo Florenco. Tre interesa estis ankaŭ la prelego okazinta en la Oblata-biblioteko fine de la foiro. Laura Brazzabeni mallonge prezentis Esperanton kaj parolis pri la nunaj multnombraj eblecoj ĵurni ĝin vizaĝe aŭ rete kaj la rilataj lingvaj atestiloj. Mia tasko estis foti kaj vi mem povas spekti ĉion ĉe ĉi tiu ligilo

<https://youtu.be/YL4PjNpuW50> .

Mirejo mesaĝas salute al la ĉina kongreso

Grava kunveno, feliĉa okazo revidi samideanojn kaj konatiĝi kun novaj membroj, tempo por ideointerŝanĝoj kaj signifoplenaj decidoj.

Grava kunveno de ekzistanta tutlanda strukturo, kiel ekzistas en dekoj da landoj en la mondo : la landaj asocioj de UEA. Ili estas la vertebraro de nia Asocio UEA. Diligentaj kolegoj transprenas oficon kaj vivigas ilin.

Ne ĉiuj esperantistoj pretas labori teame en tiaj strukturoj. Estas arboj, kiuj staras solaj meze de kampo aŭ ebenaĵo. Oni vidas ilin de for kaj ili same efikas kiel la arboj de arbaroj, kiuj kune kreas mondon de vegetalaĵoj. Estas esperantistoj, kiuj tre brile laboras ekster la landaj strukturoj kaj ilia laboro same efikas, valoras, respektindas. Mi volas mencii la gigantan laboron de Dr-o Katalin Kovats, kiu prizorgas www.edukado.net; tiu paĝaro ne faras ombron al ILEI, tiu paĝaro estas valora aldono, kompletigo, plia eblo helpi la lernantojn kaj la instruistojn. Mi volas mencii la gigantan laboron de HORI Yasuo, kiu lanĉis kaj prizorgas la Esperanto-Sumoon. Ekzistas pluraj tiaj entreprenoj, Esperanto-centroj, kiuj kontribuas al la divastigo de nia lingvo sen ligiĝi al la landaj strukturoj. Ili havas la rajton fari tion kaj ni ĉiuj devas en plena respekto kunlabori kun ili.

Mi deziras, ke la Ĉina Esperanto-Movado floru kaj kresku en harmonia kunlaboro kun la aliaj agemaj esperantistoj en la tuta mondo. Ĝi estu unu el la multaj instrumentoj de granda orkestro, kies muziko estu harmonia.

Mireille Grosjean, Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES), Honora Membro de ILEI

Kurso en Ĉinio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanta-angla Kurso

Gvidantonomo: ZHANG Wei

Tipo: Nova movada kurso

Loko: DANDONG, Ĉinio

Aldoninto: Arko

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27525>

Togolandano prelegas al svisoj

Prelegos Koffitche Koufionou el Togolando, tradukisto kaj televidila teknikisto, sekretario de Afrika Komisiono de UEA kaj Apélété Agbolo, membro de la Akademio togolanda pri la eeva lingvo. Temo: La lingva situacio en Togolando kaj la lingva aspekto en la instruado. Iom pri Eo en Togolando konklude. Tio pkazos en la 29a de aprilo. Vidu pliajn detalojn en la Eventa Servo de UEA, kiu rifuzas permesi al mi komii la aliran adreson. La proksimaj personoj venu al Chapeau-Rablé 52, La Chaux-de-Fonds, al la apartamento de Mireille Grosjean. Tie estos komputilo kaj ligo al Lomeo. Interesatoj povas skribi al Mireille Grosjean por akiri la ligilon al tiu seminario.



La japana urbo Nara memoras pri Hasegawa Teru

Mi estas Takemori el Nara Esperanto-Societo. La 30-an de aprilo okazos la malferma ceremonio de " Monumento Memore al la Vizito de Hasegaŭa Teru de la Societo en Nara, manifestacii por la kamarado Hasegaŭa Teru. La Societo en Nara, manifestacii por la kamarado Hasegaŭa Teru (Verda Majo). URL: <https://www.hasegawateru-nara.com/>

Ĉi retmesaĝo celas informi esperantistojn pri la detaloj de la malferma ceremonio. Esperantistoj povas ankaŭ partopreni en la ceremonio. Tamen por ĉiuj, kiuj jam donacis por la konstruado de la "monumento" ne necesas kontakti ĉi tiun retmesaĝon, ĉar la invito estis sendita de la Societo en Nara, manifestacii por la kamarado Hasegaŭa Teru.

Se vi ŝatus partopreni en la malferma ceremonio, bonvolu respondi al Nara Esperanto-Asocio kaj kontakti nin kun la informoj por la sekva malferma ceremonia ĉeesto-avizo, pri kiu Nara Esperanto-Societo poste informos la Societon en Nara, manifestacii por la kamarado Hasegaŭa Teru. Por preparoj, bonvolu respondi ĝis la 31-a de marto.

TAKEMORI Hirotoŝi, reprezentanto de Nara Esperanto-Societo
retpoŝto: takeh703@yahoo.co.jp

===== vortoj: 1240 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.